

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. CL. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX SUR MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE
c.c.p. Association Catholique Française pour l' Esperanto ROUEN 2324 93 N.

==== la n°: 2,50 F; abono: 8 F; kotizo: 2 F; sume: 10 F. ====
XX

----- N° 114 ----- BULLETIN TRIMESTRIEL ----- TRIMONATA BULTENO -----
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

--- OKTOBRO 1977 ---
=====

XX

BILETO DE LA PREZIDANTO.

A l' heure où j' écris ces lignes, je n' ai pas d' informations détaillées sur le déroulement du congrès de IKUE qui a eu lieu à Censtobova. A l' écoute de Radio-Vatican, j' ai appris cependant qu' il avait été très réussi et qu' une nombreuse participation avait répondu à l' invitation de nos frères polonais.

N' ayant pu, à mon vif regret, me rendre à ce congrès, je suis demeuré par l' esprit, en ces jours proches de la fête de l' Assomption, tout près de ceux que notre foi et notre idéal réunissaient en ce grand centre marial.

Nous attendons qu' un prochain numéro d' Espero Katolika nous apporte informations et conclusions des travaux de cette importante rencontre internationale.

Qu' il me soit permis ici de saluer l' heureuse évolution de cette revue qu' une meilleure présentation et un contenu amélioré recommandent plus que jamais à la lecture de tous nos membres et de tous nos amis.

A notre tour, sur un plan plus modeste, nous préparons la rencontre annuelle de notre Association nationale, sur laquelle vous trouverez quelques détails dans les pages suivantes.

Peut-on espérer que, pour beaucoup d' entre nous, ce congrès sera celui de l' action, de la marche en avant? Nous devons nous y préparer et y venir avec l' intention ferme de travailler à l' extension de notre activité, tant par un effort de pratique de notre idéal que par la multiplication des contacts, sur le plan local, partout où nous nous trouvons.

Il s' agit de nous faire connaître, de créer des sympathies, mais surtout de donner aux autres, principalement aux jeunes, le désir de connaître et d' utiliser la Langue Internationale et de multiplier les moyens d' en apprendre les éléments.

René - Claude COLAS.

XX

VENONTA KOMITATKUNVENO.

Dimanĉon, la 11-an de decembro, je la 14.30, 4 bis, rue de la Cerisaie PARIS.
La observantoj ĉiam estas bonvenaj!

* * * * *

AL VI, NI PETKRIAS

=====

Mi estas soleca,
Vi sola estas la amiko, kiu konas min.
Miaj okuloj estas blindaj,
Vi metas lumon en mia hejmo.

Ni estas via popolo.
Kompatu, al vi ni petkrias.

Mia koro estas nur cindro,
Via koro estas fajro de arda vepro.
Mia korpo estas nur lepro,
Viaj manoj estas saniganta fonto.

Nokto alvenas por min preni;
Mia nokto fariĝas tago, kiam vi prenas panon.
Morto deziras perfidi min,
Via morto vivigas min en via Dia vivo.

Miaj putojj sekiĝas,
Via sango ĝojigas, kiel novfermentita vino.
Malsato turmentas min,
Via korpo estas karno de Paska ŝafido.

Didier Rimaud (traduko AB)

=====

GRAVAJ INFORMOJ

- 1) 23-an de oktobro: jara festo de TESPAs (Teatro Esperanto de Paris).
Prezentado de: "LA JUSTULOJ" de A. Camus. Tradukis G. Lagrange
je la 15.00 en la MJC 14, rue Censier 75005 - PARIS (metrostacio Censier)
(provincaĵoj aŭ alilandanoj, kiuj volus tranokti bonvolu sin anonci).
- 2) 28-a de oktobro: televido FR 3 "Tribune Libre" je la 19.40: " L' U.F.E." ..
La trian fojon oni uzas tiun altefikan popolamasan informrimedon.

=====

LETEROJ EL ROMO

S-to Roger Degrelle el Nancy diras en du poŝtkartoj: "Mi sendas al vi miajn plej korajn salutojn, esperante, ke viaj aŭskultantoj ĉiusemajne plinombrigiĝas kaj skribas al vi. Mi scias, ke vi estas sufiĉe kontentaj pri la nombro de la korespondantoj; des pli bone. Trovu ĉi tie miajn plej kuraĝigajn pensojn por ke vi daŭrigu senĉese kaj senlace vian bonegan taskon".

Ŝanĝon de adreso (sekve de translokiĝo de Les Andelys al Baugé) komunikis al ni S-ino Jeannine Vincent, kiu, cetere, regule havigas al ni la bonege redaktitan bultenon "Franca Katolika Esperantisto". Ni envas nian amikinon, kiu nun loĝas tute proksime al la Esperanto-kulturdomo ĉe la kastelo Grésillon!

=====

RADIO ROMA ESPERANTO - NOVAĴOJ EL ITALUJO

teksto de Vella Corsini, traduko de Antonio de Salvo

EN KREMONO ALTVALORAJ INSTRUMENTOJ EL LA TUTA MONDO

La italoj, bedaŭrinde, ĝenerale ignoras Kremonon, la urbo de la violonfabrikistoj STRADIVARI, urbo, kiu male altiras amasojn da turistoj el ĉiuj landoj kaj tipoj. Stratoj kaj placoj ofte pleniĝas per fremduloj, kiuj admiras la Urbodoman placon (unu el la plej belaj en Italujo, majeste dignan kaj ruĝkoloran), kaj precipe la sonorilturon de la katedralo, la plej altan konstruaĵon el brikoj ekzistantan en Eŭropo.

Kremono lasis rimarkindajn spurojn en la arthistorio, sed precipe en la muzika kampo, unue per la genio de Claŭdio Monteverdi, kaj poste per la glorplena vico de violonfaristoj (Amati, Guarneri, Stradivari), al kiuj ligiĝas la famo de la urbo en la mondo.
./...

Kremono ĉiam flegis sian tradicion, kaj en 1938 ĝi ankaŭ starigis internacian lernejon pri liutarto. Antaŭ nelonge, dum oktobro, okazis en Kremono la unua Internacia Trienalo pri arĉinstrumentoj: semajno de aranĝoj, kiuj engaĝis liutmajstrojn, fakulojn, violonistojn, muzikajn kritikistojn kaj muzikamantojn el la tuta mondo, pruvante, ke altkvalita manfara agado kapablas influi sur la socian realon de muziko.

Kerno de la Trienalo estis liutkonkurso, kiu altiris al Kremono 250 instrumentojn (violonojn, violojn kaj violonĉelojn); sed la plej altvalora prezentado estis, sendube, tiu de la antikvaj instrumentoj, asekuritaj laŭ valoro de pli ol tri miliardoj da liroj: du fabrikitaĵoj de Amati, sep de Stradivari, unu de Guarnieri. La violonoj estis aranĝitaj duope en vitrinoj kapablaj rezisti je kuglopafado; ili pendis per nilonaj fadenoj, kiuj kreis malrapidan kaj solenan rotacion. Ŝaltilo ebligis interrompi la movon, por pristudi detalon aŭ legi latinan skribaĵon aŭ simbolon, ekz. la faman A.S. kun latina kruco de Antonio Stradivari; se oni denove ŝaltis, la violono rekomencis sian majestatan movon en la vitra budo, kies interna malsekeco estis kontrolita de spertuloj almenaŭ po kvar fojoj en ĉiu tago.

La momentoj de la naskiĝo de violono estis amplekse atestitaj per skizoj kaj desegnaĵoj. Stradivari havis la potencon de elstara desegnisto, provizita per geometria sentemo, sed ankaŭ malfermita al detalaj esploroj: al li daŭre rigardas la modernaj liutistoj, en la tuta mondo, kun sama fideleco kaj entuziasmo.

*

URBANOJ REMALKOVRAS KAMPARON

teksto de Velia Corsini, traduko de Antonio de Salvo

Dum pasintjara somero (1976), pli ol 90 mil geitaloj reiris al la kamparo. La statistikoj faritaj je l' epoko de la industria eksplodo certigis, ke en 1976 restas en la kamparo eĉ ne unu homo malpli ol 29-jara. Male, 300 mil gejunuloj en laboraĝo okupiĝas, nuntempe, pri agrikulturo, kaj ilia nombro verŝajne kreskos. Reiras al la kamparo la iamaj forfuĝintoj, la urbanoj elreviĝintaj, sed ankaŭ gejunuloj, dudekjaruloj, la heredantoj de la hipia protestomovado. La grundo kiel lasta ŝanco, kiel ripozo, kiel sekureco. Sufiĉis ekscii, ke la progreso povas ankaŭ halti, kaj naskiĝis perturboj kaj timo.

Ĉio ŝanĝiĝis dum la lastaj du jaroj. En la itala kamparo, ofte homoj demandas ĉu ekzistas aĉetebla grundo, sed nenio plu restas en kelkaj regionoj (ekz. en Toskanio). Eble sur la montaro aŭ sur la pli altaj montetoj, sed la pli fekundaj terenoj jam estas forvenditaj. Kamparano nun ne plu hontas, eĉ li fieras, ĉar ĉiuj serĉas lin. Kompreneble, la nuna kamparano malsimilas al tiu iama: li ne plu havas grandan kvanton da satigendaj infanoj, ekzistas maŝinoj, elektro, komforto, kaj la atingo de urbo jam ne estas problemo.

Ĉi tiu reiro al la kamparo ne estas nur itala fenomeno: en Usono, ekz., la lastaj tri jaroj vidis la eksplodan kreskon de novkamparanoj: entreprenistoj kaj profesiuloj aplombe alfrontas la aventuron.

La reiro al la kamparo stimulas individualismon, meditemon, spiritualismon: ecojn, kiuj ŝajnis sepultitaj fare de la trafiko. Kamparano estas pli respondeca, li postulas malpli de la socio, li sentas sin pli izolita sed ankaŭ pli sendependa. La protesto de tiu, kiu remalkovras la grundon, entenas la malakcepton de konsumismo, sed ankaŭ de pensegaligo, de ideologioj, de perforto. Kelkaj jam ekvidis tion kaj klopodas ion fari por eviti, ke tiuj, kiuj intence elektis agrikulturon, fremdiĝu el la komuna vivo.

"Iusence - diras fakulo pri psikologio - samkiel dum mezepoko, la homoj fuĝas al la kamparo, ĉar ili malamas dekadencan civilizon kaj timas la alvenon de barbaroj, kiuj identiĝas kun la rabistoj, kun la marksisma sistemo, kun perforto".

*

ANTAŭ SEP JARCENTOJ KAJ DUONO MORTIS SANKTA FRANCISKO

teksto de Velia Corsini, traduko de Antonio De Salvo

Etaj kaj grandaj manifestacioj disvolviĝas ek de pasinta aŭgusto en la kadro de ampleksa programo pretigita de la Komitato por la celebrado de la 750-jara datreveno de la morto de S-ta Francisko, okazinta en Asizo la 4-an de oktobro 1226. La manifestacioj, kiuj daŭros pli ol unu jaron, havas liturgian, kulturen kaj artan karakteron kaj implikas fakulojn, religiajn kaj civilajn aŭtoritatulojn

kaj la amasojn de la fideluloj, de kiuj S-ta Francisko estas unu el la plej amataj sanktuloj.

La sankteco de Francisko, pro kelkaj esceptaj karakterizoj, povas ŝajni neimitebla modelo, sed la signifo de lia instruo estas eterne valida kaj ĉiam aktuala, ankaŭ kiel atesto de konsciiĝo pri si mem kaj pri sia destino.

Filo de riĉa vendisto de ŝtofoj, Francisko kreskis meze de riĉeco, kaj ŝajnas, ke revoj pri milita gloro kaj aventuroj plenigis lian junaĝon. Sed la kaptiteco sekve de malgranda batalo, sinsekvaj malsanoj, avertaj sonĝoj, limkondukis al meditado pri lia vera vokaĝo; kaj li renversis ĉiujn kutimajn valorojn, ne nur malakceptante la terajn allogojn laŭ la tradiciaj formoj de asketismo, sed akceptante kiel pozitivajn tiujn neŝatatajn kontraŭojn de ĉiuj ĉiuj fuĝas: tio estas, li trovis serenecon kaj ĝojon en la sufero kaj en la humiliĝo. Tiel, en 1206, Francisko, antaŭ la patro, kiu ne kapablis kompreni kaj insultis, antaŭ la surprizita episkopo de Asizo, forprenis de si ĉiujn vestojn, forlasis hontemon kaj orgojlon kaj celebris sian mistikan edziĝon al la malriĉeco por fariĝi libera. Tri jarojn poste, li ankaŭ demetis siajn ŝuojn kaj tenis nur la simplan kitelon de la kamparanoj, ligitan per ŝnura rimeno, kun la humila fiereco enkarnigi la reĝan dignon de la malriĉuloj, necesan viatikon al la ĉielo.

Francisko iĝas "la malriĉulo el Asizo" kaj, kvankam li ne intencas montri sin majstro, li decidite alprenas la vojon de la almozanta malriĉeco kaj iras tra la stratoj prediki la plenumon de la evangeliaj ordonoj.

En lando, kiu kutimis blindigi la birdojn kaj bastoni la ŝarĝobestojn, Francisko proklamas sian amon al ĉiuj kreitaĵoj, ankaŭ al tiuj plej humilaj, predikas al la birdoj, dresas savaĝajn turtojn, konvertas lupon, atestas per humila firmeco la fratan ligan, kiu kunigas ĉiujn vivoformojn.

Kiam li mortis, Francisko havis nur 45 jarojn, sed la malforta fiziko kaj dudek jaroj da rigora asketeco estis senigintaj lin de ĉiuj fortoj. Du jarojn antaŭe, sur la aspra Verna ponto, la vizio de kerubo kun ses radiantaj flugiloj estis trafinta lin per la stigmatoj de la Krucifikso.

Pri li oni diris, ke "li estis la plej perfekta bildo de Kristo". Teologoj kaj historiistoj samopinias, ke lia rilato al la kreitaĵoj estis tiel escepta, ke ŝajnis, ke en li la homaro retrovis la naivecon perditan pro la unua peko.

Je distanco de 750 jaroj, hodiaŭ kiel hieraŭ, S-ta Francisko el Asizo restas la protagonisto de spirita aventuro, kiu iĝas limunu el la plej gigantaj figuroj ne nur de la kristana vivo, sed de la tuta vivo de l' Homaro.

*

KREDO KAJ FOLKLORO EN ANTIKVAJ NAPOLAJ FESTOJ

teksto de Velia Corsini, traduko de Antonio De Salvo

La regiono ĉirkaŭ Napolo posedas folkloron, kiu datumas de la epoko de la oska popolo, kiu loĝis tie eĉ pli frue ol grekoj kaj romianoj. Ekzistas ankoraŭ festoj, kiuj havas internacian famon, kaj altiras turistojn ankaŭ el malproksimaj landoj.

En junio okazas du gravaj festoj en du ĉarmaj urbetoj: Torre del Greco kaj Nola. La festo "de la kvar altaroj" en Torre del Greco estas tipe religia; ĝi memorigas la miraklon de Bolsena (1263), kiun spertis germana sacerdoto mekredema pri la ĉeesto de Kristo en la eŭkaristio. Temas pri esprimo de popola arto, ĉar la altaroj ŝuldiĝas al arĥitektoj, pentristoj kaj skulptistoj, sed la veraj vivigantoj de la festo estas la prilaborantoj de koralo, kameo kaj testudo, kiuj konsistigas la plej tipan industrion de tiu urbeto.

Por la konstruado de la altaroj kunlaboras masonistoj kaj lignaĵistoj, kiuj, ĝis antaŭ nelonge, tiom faris senpage. Oni komencas per ligna armaturo, larĝa inter 20 kaj 30 metrojn kaj larĝa samkiel la strato; oni ĝin kovras per blanka tolo, drapoj kaj kolonoj el arĝentumita aŭ orumita kompakta papero. Sur ĉiu altaro oni metas pentraĵon aŭ skulptaĵon, kiu ĝenerale prezentas bibliajn scenojn; sed ĉarma karakterizo de ĉi tiu festo estas la flortapiŝoj, kiuj same prezentas religiajn bildojn. La festo daŭras du aŭ tri tagojn: impona procesio, antaŭita de grandioza torĉolumigado, laŭiras la urbajn stratetojn, meze de karakterizaj festolumoj kaj arkaĵoj kun buntaj desegnoj kaj vivaj koloroj. Muziko kaj kantoj kompletigas la gajan solenon.

La festo "de Lilioj" okazas en Nola la 23-an de junio, honore al S-ta Paŭl-eto (itale "Paolino"), patrono de la antikva urbo. Nola estis fondita en 471 a.K. kaj estas unu el la plej antikvaj kaj historiplenaj de la regiono. Tie Hanibalo

estis venkita kaj de tie ekmarŝis al Romo la legioj de Pompeo; tie mortis la imperiestro Aŭgusto kaj naskiĝis la filozofo Giordano Bruno, la ribela dominikano.

Ankaŭ en ĉi tiu festo folkloro kaj arto kunĝandiĝas. La "Lilioj" estas lignaj konstruaĵoj altaj de 25 ĝis 30 metroj, kiuj similas al sonorilturoj (S-ta Paŭleto, laŭ la tradicio, estas la elpensinto de sonorilo, kiu en la itala nomiĝas "campana" ĝuste en rilato kun Kampanio, la regiono de Nola). Grandiozaj, laŭ diversaj stiloj, la lilioj moviĝas tra la stratoj meze de nedirebla bruego; la vojo estas tre komplika kaj malfacila kaj la homoj, kiuj irigas ĉi tiujn kolosajn objektojn, estas veraj ekvilibrantoj. La procesio finiĝas en la katedrala placo, antaŭ la statuo de la sanktulo, kiu ricevas la ĝojan amaĝon de la popolo tra ĵetado de konfetoj.

Ĉi tiuj festoj, kiuj konserviĝis tra la jarcentoj, atestas pri popola kredo, kiu daŭre restas en la popolo de suda Italujo kaj kiu esprimiĝas per folkloro progresive mortonta.

+++++

LINGVA ANGULO

Ĉu pro la someraj libertempoj? Alvenis nur ses respondoj al niaj proponoj aperintaj en la julia bulteno n° 113, nome de S-roj Bourgeois (B), Dauchez (Da), Despiney (De), Guillon (G), Le Marquand (L) kaj S-ino Michau (M). Jen iliaj tradukproponoj:

1) rouler sur les chapeaux de roue: kolrompe konduki (B); plenriske veturadi, limrapide veturi (Da); ĝiri (?) je ekatrema rapido (De); rapidege veturi laŭ vojturniĝoj (G); rapidege veturi, plejrapide veturi (L); senbremse starti, veturapidegi (M).

2) être sur les dents: stari alarme, febre klopodegi, esti forbaronta ĉian ajn surprizatakon, esti konstante singarda kontraŭ surprizo (B); esti nerve urĝigita (Da); esti trolaciĝita (De); angore zorgi pri grava afero (G); nerveze streĉiĝi, pro antaŭtimo streĉiĝi (L); esti elĉerpe laca (M).

3) avoir quelqu' un à l' oeil: streĉe kvati iun, sperti ies nefidindecon (B); malfide spioni (Da); senmalstreĉe prigardi iun (De); bone atenti pri suspektinda persono (G); teni iun sub sia rigardo (L); suspekte iun observi (M).

4) ah! la barbe! nu! for kun ĝi! ja sufiĉe! Ĉesu min tedi! (B); kia tedaĵo! (Da, L); ba! kia ĝenulo! (De); ha! kia seninteresaĵo! (G); kiel tedege! supertede! (M)

5) mon oeil: blufo! vento, ĉio tio! ne kredinde! (B); ne esperu mian helpon, mi ne kredas vin (Da); nekredeble (De); mi tute ne iluzias (G); tute ne! dubinde! (L); nepre refutinde, vane atendadu (M).

6) par les temps qui courent: en la nuna cirkonstancaro (B), en la nunaj cirkonstancoj (B; G); en la nunaj aĉaj tempoj (Da); dum la nunaj tempoj (De, L); en nun tempaj kondiĉoj (M).

7) nom d' un chien: fulmotondro (B); je la nomo de diablo (Da); skorzonero (De); per hundo (G); korpo de Bakko, jela kukolo, je la hundo (L); hundaĉnome, friponeto (M).

8) j' ai le nez pris: mia nazo estas ŝtopita (B, Da), mi ne povas spiri per la nazo (B); mi havas nazkataron (De); mi iomete malvarmumis (G); mi malvarmumis, min trafis korizo (rinito) (L); anonciĝas naza kataro (M).

9) conduire par le bout du nez: konduki per la nazo, teni en vindaĵoj (B); konduki kvazaŭ per nazo, allogeme inciti (Da); laŭ sia plaĉo konduki iun (Da); trakti iun kiel bekpikanta kokino (G); farigi al iu ĉion, kion oni volas (L); obeigi senkondiĉe (M).

10) j' en ai plein le dos: mi supersatas je ĝi (B); mi estas tede laca (Da); pri tio mi estas trotedita (De); tion mi ne plu kapablas toleri (G); mi tediĝas, mi pleje tediĝas (L); superŝarĝe mi dorskliniĝas (M).

Post tio, jen la fina klasifiko por la jaro 1977:

1) S-ro BOURGOIS (25); 2) S-ino MICHAU (22); 3) S-ro LE MARQUAND (19); 4) S-ro GUILLON (11); 5) en egaleco S-roj DAUCHEZ kaj DESPINEY (10); 7) en egaleco S-roj DE SALVO kaj RIBOT (5).

Sinceran gratulon al ĉiuj partoprenintoj pro ilia kuraĝo kaj lerteco.

Laŭ la regularo aperinta en FKE n° 107 p. 7, S-ro Bourgeois gajnas premion en valoro de 50 F; S-ino Michau premion en valoro de 25 F kaj S-ro Le Marquand

Premion en valoro de 10 F. La tri gajnintoj bonvolu skribi al la redaktorino pri siaj deziroj: ĉu abono al gazeto, ĉu libro(j), ĉu simpla kreditkarto.

Nova konkurso komenciĝos en la januara n^o kun la jenaj p^remioj:
1) 50 F; 2) 30 F; 3) 20 F.

Jen la esprimoj tradukotaj, proponitaj de S-roj Bourgeois kaj Lecroisey:
1) à tire-larigot; 2) y mettre du sien; 3) y mettre le paquet; 4) gâter la sauce;
5) prendre les jambes à son cou; 6) se tourner les pouces; 7) ne pas s' en faire;
8) s' embêter à cent sous de l' heure; 9) écraser de son mépris; 10) s' embarquer sur une galère.

XX

NI IOM CERBUMU...

HORIZONTALE

1 2 3 4 5 6 7 8
1 ! ! ! ! ! ! ! !
2 ! ! ! ! ! ! ! !
3 ! ! ! ! ! ! ! !
4 ! ! ! ! ! x ! ! ! x
5 ! ! ! ! ! x ! ! ! !
6 ! ! ! x ! ! ! ! ! x

- 1. gelateno tirata el kelkaj specoj de algoj (R)
- 2. kokokrio
- 3. karakterizas la unuan primitivan formon de io (R)
- 4. vegetaĵo servanta por nutrado de hejmaj birdoj (R)
sufikso esprimanta abstraktan ideon de kvalito
- 5. grasa fluaĵo (R)
- 6. havanta akraĵon guston, kiel tiu de vinagro (R)
- 7. konjunkcio montranta la logikan sekvon
signo lokata ĉe la komenco de la notliniaro

VERTIKALE

- 1. alĝustigi, adapti ion, por ke ĝi povu funkcii (R)
- 2. la plej granda simio el Afriko
- 3. genro de kompozitoj (R)
- 4. estri la aferojn de la ŝtato
- 5. muzika ritma melodio (R); fizika proksimiĝo en ia direkto (prepozicio)
- 6. aparta loĝejo por la virinoj en la hejmo (R)
- 7. arbo el familio de papiliacoj
- 8. ĉiu parto de teatra verko (R)

(R) signifas nur radikon Solvo en la venonta numero

XX

NIA MEMBRARO

Nova dumviva membro: 40) S-to DEGRELLE (M & M)
Novaj membroj 1977: 9) S-ro RANNOU (I & V)
10) S-to BARNQUIN (Isère)
11) S-ino ADNET (A-M)

Fratan bonvenon al ili kaj baldaŭan ekkonon en Tours!

XX

SPECIALA ALVOKO!!!

Se vi intencas malfermi aŭ jam malfermis novajn kursojn en via loko, ĉu en lernejo, ĉu ekster lernejo, nepre sendu al la redaktorino ĉiujn detalojn: loko, horaro, nivelo, nombro da gelernantoj, nomo de la gvidanto, metodo uzata, eventuale nomo de la instanco, kiu aŭspicias la kurson k.t.p. Tiuj informoj aperos en nia bulteno kaj eble helpos la hezitemulojn ankaŭ transpasi Rubikonon... Nepre uzu la novan adreson de S-ino Vincent 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE Tel. (41) 89 29 47. Bonvolu ankaŭ noti, ke ŝi forestos el Baugé ĝis la 15-a de novembro. Tio donos al vi pli da tempo por prepari materialon por la januara numero. Antaŭan dankon!

